

Pri komparo de integraloj de Lebesgue kaj Riemann en konstrua matematika analizo

A. A. Vladimirov

Resumo: Estas trovita sumebleco de ĉiu konstrua funkcio, kiu estas difinita preskaŭ ĉie en la intervalo $[0, 1]$ kaj integralebla en senco de Riemann.

§ 1. Enkonduko

1. Teorio de integralo, disvolvata enkadre de konstrua matematika analizo, en multaj flankoj okazas esence diferenca de tradicia teorio, kiu apogas sin sur la teorio de aroj. Ekzemple, tie disiras [1] du sencoj de integraleblo, ligitaj al la nomoj de Riemann kaj Darboux, kiuj laŭ la vidpunkto de teorio de aroj estas rigardataj kiel tute interŝanĝeblaj. Sekve, la problemo pri komparo de integraloj de Riemann kaj Lebesgue, en tradicia teorio facile solvata kun helpo de la fakto de sumebleco de ĉiu funkcio, integralebla en senco de Darboux, laŭ la vidpunkto de konstrua branĉo de la matematiko okazas sufiĉe neklara.

Uzante rezultaton de G. S. Cejtin pri senrompeco de konstruaj funkcioj [2: Ĉap. 9, §2], oni povas nemalfacile trovi, ke kiu ajn ĉie difinita konstrua funkcio $f: [0, 1] \rightarrow \mathbb{R}$ en okazo de ĝia integraleblo en senco de Riemann estas sumebla. Tamen tiu rezultato ne elĉerpas la problemon. Enkadre de teorio de integralo, multe pli nature estas konsideri ne funkciojn, difinitajn ĉie (kiel estis farate, ekzemple, en la verko [3]), sed funkciojn, difinitajn *preskaŭ ĉie* (precizaj difinoj estos donataj poste). En okazo de konsiderado de tiaj funkcioj, antaŭcitita pruvo ne povas esti reproduktata senpere. Tiu ĉi artikolo estas dediĉita al la trovo de sumebleco de ĉiu funkcio, kiu estas difinita preskaŭ ĉie en la intervalo $[0, 1]$ kaj integralebla en senco de Riemann.

2. Poste ni apogos nin sur konstrua formo de tiu difinmaniero de integralo de Lebesgue, kiu estis ellaborita de P. Daniell [4: §61]. Tiu formo estas preskaŭ egala kun "klasika", postulante nur precizigon de kelke da esprimoj pro plenumata en la konstrua analizo akcepto de ekzistado de Specker'aj nombraj vicoj. La skiza esprimo de tiu teorio estos donata en §2.

§ 2. Funkcioj, difinitaj preskaŭ ĉie

1. Vicon $\{h_n\}_{n=0}^{\infty}$ da nemalpozitivaj multangulaj funkcioj [NMF] ni poste nomos *regula* [RVNMF], se ĝi obeas rilaton

$$(\forall n \in \mathbb{N}) \quad \int_0^1 h_n < 2^{-n}.$$

Fundamento de la teorio de integralo de Lebesgue konsistas el la sekvanta facila fakto.

1.1. Estu h multangula funkcio, kaj estu $\{h_n\}_{n=0}^{\infty}$ RVNMF, kiu obeas la kondiĉon

$$\int_0^1 h > \sum_{n=0}^{\infty} \int_0^1 h_n.$$

En tiu okazo estas realigebla punkto $\xi \in [0, 1]$, por kiu nombra serio $\sum_{n=0}^{\infty} h_n(\xi)$ celas al iu reala nombro, severe malgranda ol la nombro $h(\xi)$.

P r u v o. Estas klare, ke estas realigebla valoro $\varepsilon \in (0, 1)$, kiu obeas la kondiĉon

$$\int_0^1 (h - \varepsilon) > \sum_{n=0}^{\infty} \int_0^1 (1 + \varepsilon)^n h_n.$$

Do, per ordinara maniero de sekcado de intervalo, oni povas facile trovi realigeblecon de punkto $\xi \in [0, 1]$ kun eco

$$(\forall m \in \mathbb{N}) \quad h(\xi) - \varepsilon \geq \sum_{n=0}^m (1 + \varepsilon)^n h_n(\xi).$$

Tiu punkto ja estas serĉata. □

2. Kun ĉiu RVNMF $\mathfrak{h} \Rightarrow \{h_n\}_{n=0}^{\infty}$ oni povas ligi aron $M_{\mathfrak{h}}$ da duopoj $(x, \gamma) \in [0, 1] \times \mathbb{R}$ obeantaj al la kondiĉo

$$(\forall m \in \mathbb{N}) \quad \sum_{n=0}^m h_n(x) \leq \gamma.$$

Simbolo $\Omega_{\mathfrak{h}}$ signifos poste ombron $\{x \in [0, 1] : (\exists \gamma \in \mathbb{R}) (x, \gamma) \in M_{\mathfrak{h}}\}$ de la aro $M_{\mathfrak{h}}$. La ideo pri *preskaŭ plena* subaro [PPS] de la intervalo $[0, 1]$ povas nun esti esprimata per la sekvanta maniero.

2.1. *Subaro $X \subseteq [0, 1]$ estas nomata preskaŭ plena, se oni povas realigi je RVNMF \mathfrak{h} kun eco $\Omega_{\mathfrak{h}} \subseteq X$.*

Simile al la situacio de "klasika" analizo, oni povas facile konvinkiĝi pri la sekvantaj faktoj.

2.2. *Ĉiu PPS enhavas almenaŭ unu punkton [1.1].*

2.3. *Komuna parto de du arbitraj PPS ankaŭ estas PPS.*

2.4. *Komuna parto $\bigcap_{n=0}^{\infty} X_n = \{x \in [0, 1] : (\forall n \in \mathbb{N}) (n, x) \in X\}$ de arbitra vico $X \subseteq \mathbb{N} \times [0, 1]$ da PPS $X_n \Rightarrow \{x \in [0, 1] : (n, x) \in X\}$ ankaŭ estas PPS.*

P r u v o. Estu $\{h_{n,k}\}_{k=0}^{\infty}$ RVNMF, kiuj en senco de la difino 2.1 respondas al aroj X_n . Ni konsideru vicon $\mathfrak{g} \Rightarrow \{g_k\}_{k=0}^{\infty}$ da NMF kun formo

$$g_k \Rightarrow \sum_{n=0}^k 2^{-2n-1} h_{n,k-n}.$$

Tiu ĉi vico videble estas regula. Dume ĉiu duopo $(x, \gamma) \in M_{\mathfrak{g}}$ obeas rilatojn

$$\begin{aligned} \sum_{k=0}^m h_{n,k}(x) &\leq 2^{2n+1} \sum_{k=0}^m g_{n+k}(x) \\ &\leq 2^{2n+1} \gamma, \end{aligned}$$

kiuj garantias verecon de rilatoj $x \in X_n$. Sekve, la rilato $\Omega_{\mathfrak{g}} \subseteq \bigcap_{n=0}^{\infty} X_n$ estas ankaŭ vera. □

2.5. *Por ĉiu RVNMF $\{h_n\}_{n=0}^{\infty}$ oni povas realigi je PPS $X \subseteq [0, 1]$ kun eco*

$$(\forall x \in X) (\exists C \in \mathbb{R}) (\forall n \in \mathbb{N}) \quad h_n(x) < C \cdot (3/4)^n.$$

P r u v o. Ni konsideru vicon $\mathbf{g} \rightleftharpoons \{g_n\}_{n=0}^\infty$ da NMF kun formo

$$(1) \quad g_n \rightleftharpoons \frac{(4/3)^{2n} h_{2n} + (4/3)^{2n+1} h_{2n+1}}{2}.$$

Tiu ĉi vico estas regula pro la rilatoj

$$\begin{aligned} \int_0^1 g_n &< \frac{(4/3)^{2n} 2^{-2n} + (4/3)^{2n+1} 2^{-2n-1}}{2} \\ &= (5/6) \cdot (4/9)^n \\ &\leq 2^{-n}, \end{aligned}$$

garantiataj de reguleco de la vico $\{h_n\}_{n=0}^\infty$. Dume ĉiu duopo $(x, \gamma) \in M_{\mathbf{g}}$ obeas [(1)] kondiĉojn $h_n(x) \leq 2\gamma \cdot (3/4)^n$. \square

3. Ni konsideru tuj la situacion, se al ĉiu punkto $x \in X$ de iu PPS, ligita kun la vico \mathbf{h} en senco de la difino 2.1, respondas iu konstrua objekto $f(x)$. Laŭ la vidpunkto de konstrua kompreno de matematikaj juĝoj, tio signifas, ke estas realigebla kalkulplano \hat{f} , kiu konvertas ĉiun duopon $(x, \gamma) \in M_{\mathbf{h}}$ al objekto $f(x)$. Tiu rimarko kondukas nin al la sekvanta esprimo de la ideo pri *difinita preskaŭ ĉie* konstrua funkcio de reala argumento [DPĈKF].

3.1. *Difinita preskaŭ ĉie en la intervalo $[0, 1]$ realvalora funkcio estas duopo $\{\mathbf{h}, \hat{f}\}$, konsistanta el RVNMF \mathbf{h} kaj konstrua bildigo $\hat{f}: M_{\mathbf{h}} \rightarrow \mathbb{R}$ kun eco*

$$(\forall (x_1, \gamma_1), (x_2, \gamma_2) \in M_{\mathbf{h}}) \quad (\hat{f}(x_1, \gamma_1) \neq \hat{f}(x_2, \gamma_2)) \rightarrow (x_1 \neq x_2).$$

Per simbolo $f(x)$, kie $f = \{\mathbf{h}, \hat{f}\}$ kaj $x \in \Omega_{\mathbf{h}}$, ni poste signos valoron $\hat{f}(x, \gamma)$, respondantan al arbitre fiksita valoro $\gamma \in \mathbb{R}$ kun eco $(x, \gamma) \in M_{\mathbf{h}}$. En okazo, se RVNMF \mathbf{h} estas ligata kun iu DPĈKF $f = \{\mathbf{h}, \hat{f}\}$, la aro $\Omega_{\mathbf{h}}$ estos ankaŭ signata per simbolo $\text{dom } f$.

4. La ideo pri *sumebleco* de DPĈKF povas esti enkondukita per la sekvanta maniero.

4.1. DPĈKF f estas nomata *sumebla*, se estas realigebla vico da multangulaj funkcioj $\{f_n\}_{n=0}^\infty$ kun eco

$$(1) \quad (\forall n \in \mathbb{N}) \quad \int_0^1 |f_{n+1} - f_n| < 2^{-n},$$

por kiu sur iu PPS estas vera la egaleco

$$(2) \quad f(x) \equiv \lim_{n \rightarrow \infty} f_n(x).$$

Integralo de Lebesgue de DPĈKF f estas en tiu okazo la nomo de la valoro

$$\int_0^1 f \rightleftharpoons \lim_{n \rightarrow \infty} \int_0^1 f_n.$$

Oni povas trovi sekvantajn kvin faktojn.

4.2. *Estu DPĈKF f sumebla kaj havanta severe pozitivan integralon. Do estas realigebla punkto $\xi \in \text{dom } f$ kun eco $f(\xi) > 0$.*

P r u v o. Ni fiksi je RVNMF $\mathfrak{h} = \{h_n\}_{n=0}^\infty$, por kiu sur la aro $\Omega_{\mathfrak{h}} \subseteq \text{dom } f$ estas vera la egaleco (2). Konforme al faritaj supozoj, estas realigebla nombro $m \geq 1$ kun eco

$$\int_0^1 f_m > \sum_{k=0}^{\infty} \int_0^1 [|f_{m+k+1} - f_{m+k}| + 2^{-m} h_k].$$

Realigebleco de punkto $\xi \in \Omega_{\mathfrak{h}}$ kun eco serĉata estas nun garantiata de la juĝo 1.1. \square

4.3. *Valoro de integralo de Lebesgue de ĉiu sumebla DPĈKF estas difinita unusence [4.1, 2.3, 4.2].*

4.4. *Estu vico $\{f_n\}_{n=0}^\infty$ da sumeblaj DPĈKF obeanta al la rilato (1). Do estas realigebla sumebla DPĈKF f , obeanta al la rilatoj*

$$\begin{aligned} (\forall x \in \text{dom } f) \quad f(x) &= \lim_{n \rightarrow \infty} f_n(x), \\ \int_0^1 f &= \lim_{n \rightarrow \infty} \int_0^1 f_n. \end{aligned}$$

P r u v o. Ni ligu kun sumeblaj funkcioj f_n esprimojn

$$(3) \quad (\forall x \in X) \quad f_n(x) = \lim_{k \rightarrow \infty} f_{n,k}(x),$$

kiuj estu veraj sur iu fiksita [2.4] PPS $X \subseteq [0, 1]$, kaj kies multangulaj funkcioj $f_{n,k}$ obeu kondiĉojn

$$(4) \quad \int_0^1 |f_{n,k+1} - f_{n,k}| < 2^{-k}.$$

Ni ankaŭ enkonduku en la konsideradon vicon $\mathfrak{g} = \{g_n\}_{n=0}^\infty$ da NMF kun formo

$$(5) \quad g_n = \sum_{k=0}^{n+2} |f_{n+2-k, n+4+k} - f_{n+2-k, n+2+k}|.$$

Laŭ garantiataj de la kondiĉoj (4) rilatoj

$$\begin{aligned} \int_0^1 g_n &\leq \sum_{k=0}^{n+2} [2^{-n-3-k} + 2^{-n-2-k}] \\ &< 2^{-n}, \end{aligned}$$

la vico \mathfrak{g} estas regula. Tio signifas [2.5, 2.3, (5)], ke estas realigebla PPS $Y \subseteq X$ kun eco

$$(\forall x \in Y) (\exists C \in \mathbb{R}) (\forall n, k \in \mathbb{N}) \quad |f_{n+2, n+4+2k}(x) - f_{n+2, n+2+2k}(x)| < C \cdot (3/4)^{n+k},$$

kaj tial [(3)] kun ankaŭ eco

$$(6) \quad (\forall x \in Y) (\exists C \in \mathbb{R}) (\forall n \in \mathbb{N}) \quad |f_{n+2}(x) - f_{n+2,n+2}(x)| < 4C \cdot (3/4)^n.$$

Aliflanke, la kondiĉoj

$$\begin{aligned} \int_0^1 |f_{n+3,n+3} - f_{n+2,n+2}| &\leq \int_0^1 [|f_{n+3,n+3} - f_{n+3}| + |f_{n+3} - f_{n+2}| + |f_{n+2} - f_{n+2,n+2}|] \\ &< 2^{-n-2} + 2^{-n-2} + 2^{-n-1} \\ &= 2^{-n} \end{aligned}$$

garantias [2.5] celhavecon de RVNMF $\{f_{n+2,n+2}\}_{n=0}^{\infty}$ sur iu PPS $Z \subseteq [0, 1]$. Arbitra DPĈKF f kun ecoj $\text{dom } f \subseteq Y \cap Z$ kaj

$$(\forall x \in \text{dom } f) \quad f(x) = \lim_{n \rightarrow \infty} f_{n+2,n+2}(x)$$

ja estas serĉata [(6)]. □

4.5. *Ĉiu nemalpozitiva sumebla DPĈKF f kun egala al 0 integralo akiras valoron 0 preskaŭ ĉie.*

P r u v o. Estas sufiĉe aluzi la juĝon 4.4 al la funkcia vico $\{nf\}_{n=0}^{\infty}$. □

5. La ideon pri preskaŭ ĉie difinita *karakteriga funkcio* de subaro ni enkondukas per la sekvanta maniero.

5.1. DPĈKF $f \Rightarrow \{\mathfrak{h}, \hat{f}\}$ estas nomata *karakteriga funkcio de subaro* $X \subseteq [0, 1]$, se ĉiu duopo $(x, \gamma) \in M_{\mathfrak{h}}$ obeas rilaton

$$\left((x \in X) \ \& \ (\hat{f}(x, \gamma) = 1) \right) \vee \left((x \notin X) \ \& \ (\hat{f}(x, \gamma) = 0) \right).$$

Subaron $X \subseteq [0, 1]$ ni nomas *mezurebla*, se por ĝi estas realigebla sumebla karakteriga funkcio. Integralo de tiu karakteriga funkcio estas nomata *mezuro de Lebesgue* de subaro X , kaj estas signata per simbolo $\text{mes } X$.

5.2. *Ĉiu mezurebla subaro kun nenula mezuro de Lebesgue enhavas almenaŭ unu punkton* [4.2].

5.3. *Subaro $X \subseteq [0, 1]$ estas PPS en tiu kaj nur en tiu okazo, se ĝi estas mezurebla kaj ĝia mezuro estas egala al 1* [4.5].

§ 3. Ĉefaj rezultatoj

1. Ni fiksu arbitran DPĈKF $f = \{\{h_n\}_{n=0}^{\infty}, \hat{f}\}$, kaj ankaŭ iun ligitan kun ĝi vicon $\{\Delta_n\}_{n=0}^{\infty}$ da mezureblaj aroj, obeantaj al rilatoj

$$(\forall x \in \Delta_n) \quad h_n(x) < (2/3)^n$$

kaj $\text{mes } \Delta_n > 1 - (3/4)^n$. Per simboloj Γ_n ni poste signos mezureblajn [§ 2.4.4] arojn $\bigcap_{k=n}^{\infty} \Delta_k$, kiuj klare obeas kondiĉojn $\text{mes } \Gamma_n > 1 - 4 \cdot (3/4)^n$.

Ni fiksi tian solveblan aron $\Theta \subseteq \mathbb{N}^3$ da triopoj (k, m, n) kun eco $k < 2^m$, ke en la okazo $(k, m, n) \in \Theta$ intervalo $I_{k,m} \equiv (k \cdot 2^{-m}, [k+1] \cdot 2^{-m})$ obeu kondiĉon $\text{mes}(I_{k,m} \cap \Gamma_n) > 0$, kaj alie ĝi obeu kondiĉon $\text{mes}(I_{k,m} \cap \Gamma_n) < 4^{-m}$. Ni fiksi [§ 2.5.2] ankaŭ kalkulplanon, kiu konvertas ĉiun triopon $(k, m, n) \in \Theta$ al iu punkto $\zeta_{k,m,n} \in I_{k,m} \cap \Gamma_n$, kaj konvertas ĉiun alian triopon $(k, m, n) \in \mathbb{N}^3$ kun eco $k < 2^m$ al iu punkto $\zeta_{k,m,n} \in I_{k,m} \cap \text{dom } f$.

Fine, ni fiksi direktitan aron \mathfrak{A} , kies anoj havas formon

$$(1) \quad \alpha \equiv (m, \{(k_l, m_l, n_l)\}_{l=0}^{2^m-1})$$

kaj obeas kondiĉojn $m_l \geq m$ kaj $l \cdot 2^{-m} \leq k_l \cdot 2^{-m_l} < (l+1) \cdot 2^{-m}$. Komparado de duopoj kun formo (1) estas plenumata per komparado de iliaj unuaj elementoj. Kun tiu ĉi direktita aro oni povas ligi ĝeneraligitan vicon $\{f_\alpha\}_{\alpha \in \mathfrak{A}}$ da sumeblaj DPĈKF kun formo

$$f_\alpha \equiv \sum_{l=0}^{2^m-1} f(\zeta_{k_l, m_l, n_l}) \cdot \chi_{l,m}.$$

Simbolo $\chi_{l,m}$ signifas tie ĉi sumeblan karakterigan funkcion de antaŭe priskribita intervalo $I_{l,m}$.

1.1. *En okazo de integraleblo de DPĈKF f en senco de Riemann, ĝeneraligita vico $\{f_\alpha\}_{\alpha \in \mathfrak{A}}$ havas celon en senco de meza valoro.*

P r u v o. Ni fiksi arbitran valoron $\varepsilon > 0$ kaj objekton $\alpha \in \mathfrak{A}$ kun eco

$$(2) \quad (\forall \alpha', \alpha'' > \alpha) \quad \int_0^1 (f_{\alpha'} - f_{\alpha''}) < \varepsilon/2.$$

Fiksinte ankaŭ du arbitrajn duopojn

$$\alpha' \equiv (m', \{(k'_\lambda, m'_\lambda, n'_\lambda)\}_{\lambda=0}^{2^{m'}-1}) > \alpha, \quad \alpha'' \equiv (m'', \{(k''_\lambda, m''_\lambda, n''_\lambda)\}_{\lambda=0}^{2^{m''}-1}) > \alpha,$$

ni povas realigi du ligatajn duopojn

$$\beta^\pm \equiv (m, \{(k_l^\pm, m_l^\pm, n_l^\pm)\}_{l=0}^{2^m-1}),$$

kie $m = \min\{m', m''\}$ kaj

$$f(\zeta_{k_l^-, m_l^-, n_l^-}) - \varepsilon/4 < \inf \left\{ \inf_{\lambda: l \leq \lambda \cdot 2^{m-m'} < l+1} f(\zeta_{k'_\lambda, m'_\lambda, n'_\lambda}), \inf_{\lambda: l \leq \lambda \cdot 2^{m-m''} < l+1} f(\zeta_{k''_\lambda, m''_\lambda, n''_\lambda}) \right\},$$

$$f(\zeta_{k_l^+, m_l^+, n_l^+}) + \varepsilon/4 > \sup \left\{ \sup_{\lambda: l \leq \lambda \cdot 2^{m-m'} < l+1} f(\zeta_{k'_\lambda, m'_\lambda, n'_\lambda}), \sup_{\lambda: l \leq \lambda \cdot 2^{m-m''} < l+1} f(\zeta_{k''_\lambda, m''_\lambda, n''_\lambda}) \right\}.$$

Estas klare, ke $\beta^\pm > \alpha$, kaj ke preskaŭ ĉie estas plenumataj la kondiĉoj

$$|f_{\alpha'}(x) - f_{\alpha''}(x)| < f_{\beta^+}(x) - f_{\beta^-}(x) + \varepsilon/2.$$

Sekve [(2)], estas vera ankaŭ la rilato

$$(\forall \alpha', \alpha'' > \alpha) \quad \int_0^1 |f_{\alpha'} - f_{\alpha''}| < \varepsilon,$$

kiu, laŭ la juĝo § 2.4.4 kaj fakto de arbitreco de valoro $\varepsilon > 0$, garantias verecon de pruvata juĝo. \square

Ni rimarku, ke la formo de ideo pri konstrua integraleblo en senco de Riemann, kiu estis uzata por la pruvo de la juĝo 1.1, ne estas nure ebla [5: Ĉap. 3]. Tamen kvazaŭ pli liberigaj komprenoj efektive kondukas al samsencaj ideoj [5, 6].

2. En la daŭro de tiu ĉi subparagrafo ni supozas, ke konsiderata DPĈKF f estas integralebla en senco de Riemann. Per simbolo g ni signas iun arbitre fiksiton sumeblan celon de la ligita vico $\{f_\alpha\}_{\alpha \in \mathfrak{A}}$ en senco de meza valoro [1.1]. Oni povas trovi la sekvantan fakton.

2.1. Por ĉiu $n \in \mathbb{N}$ oni povas realigi mezureblan aron $\Phi_n \subseteq \text{dom } f \cap \text{dom } g$ kun eco $\text{mes } \Phi_n > 1 - 6 \cdot (3/4)^n$, obeantan al la egaleco

$$(\forall x \in \Phi_n) \quad f(x) = g(x).$$

P r u v o. Ni fiksu severe kreskantan vicon $\{m_k\}_{k=0}^\infty$ da nombroj $m_k \geq n$, por kiu ligata vico $\{g_k\}_{k=0}^\infty$ da DPĈKF kun eco

$$g_k \rightleftharpoons \sum_{l=0}^{2^{m_k}-1} f(\zeta_{l,m_k,n}) \cdot \chi_{l,m_k}$$

obeas kondiĉon

$$(\forall k \in \mathbb{N}) \quad \int_0^1 |g_{k+1} - g_k| < 2^{-k}.$$

Krom tio, ni fiksu [§ 2.4.4, § 2.4.5] ankaŭ PPS $X \subseteq \text{dom } g$, kies ĉiu punkto obeas egalecon $\lim_{k \rightarrow \infty} g_k(x) = g(x)$.

Laŭ la konstruo de la aro Θ , por ĉiuj $m \in \mathbb{N}$ estas plenumataj la kondiĉoj

$$\text{mes} \left(\Gamma_n \setminus \bigcup_{l: (l,m,n) \in \Theta} (I_{l,m} \cap \Gamma_n) \right) < 2^{-m},$$

kiuj signifas [§ 2.4.4], ke la aro

$$\Phi_n \rightleftharpoons X \cap \bigcap_{m=n}^\infty \left[\bigcup_{l: (l,m,n) \in \Theta} (I_{l,m} \cap \Gamma_n) \right]$$

estas mezurebla kaj obeas rilaton $\text{mes } \Phi_n > 1 - 6 \cdot (3/4)^n$. Dume, laŭ la konstruo de la vico $\{g_k\}_{k=0}^\infty$, por ĉiu arbitre fiksiton punkto $\xi \in \Phi_n$ estas realigebla celanta al ĝi vico $\{\xi_k\}_{k=0}^\infty$ da punktoj de la aro Γ_n kun eco

$$(\forall k \in \mathbb{N}) \quad g_k(\xi) = f(\xi_k).$$

Sekve, estas vera egaleco $\lim_{k \rightarrow \infty} f(\xi_k) = g(\xi)$. Aliflanke, laŭ la konstruo de la aro Γ_n , estas realigebla valoro $\gamma \in \mathbb{R}$ kun eco

$$(\forall x \in \Gamma_n) (\forall m \in \mathbb{N}) \quad \sum_{k=0}^m h_k(x) \leq \gamma.$$

Tial, laŭ la juĝo pri senrompeco de konstruaj funkcioj [2: Ĉap. 9, § 2], estas veraĵ ankaŭ egalecoj

$$\begin{aligned}\lim_{k \rightarrow \infty} f(\xi_k) &= \lim_{k \rightarrow \infty} \hat{f}(\xi_k, \gamma) \\ &= \hat{f}(\xi, \gamma) \\ &= f(\xi).\end{aligned}$$

Kolektante trovitajn rezultatojn, ni plenigas la pruvon. □

Por atingi la finan rezultaton pri sumebleco de konsiderata DPĈKF f , ni tuj nur rimarku, ke la aro $\bigcup_{n=0}^{\infty} \Phi_n$, sur kiu DPĈKF f estas egala al sumebla DPĈKF g , estas preskaŭ plena [§ 2.5.3].

Citita literaturo

- [1] *A. A. Владимиров.* О сравнении интегралов Дарбу и Римана в конструктивном математическом анализе // Записки науч. семинаров ПОМИ. — 2012. — Т. 407. — С. 7–16.
- [2] *Б. А. Кушнер.* Лекции по конструктивному математическому анализу. М.: Наука, 1973.
- [3] *О. Демут.* Интеграл Лебега в конструктивном анализе // Записки науч. семинаров ЛОМИ. — 1967. — Т. 4. — С. 30–43.
- [4] *F. Riesz, B. Sz.-Nagy.* Leçons d'analyse fonctionnelle, ed. 6. Budapest: Akadémiai Kiadó, 1972.
- [5] *Б. А. Кушнер.* Некоторые массовые проблемы, связанные с интегрированием конструктивных функции // Труды МИАН им. В. А. Стеклова. — 1970. — Т. 113. — С. 39–72.
- [6] *А. А. Владимиров.* О сепарабельных направленностях в конструктивных топологических пространствах // arXiv:1009.5335. — 2010. — С. 1–12.